

## SUZANA

de Adriano Celentano  
Esperantigo: Emanuele Rovere

Tagojn sep en Portofino, pli ol dek en Saint Tropez,  
poste diris vi: koketo, mi plensatis per “patè”,  
kaj kaŝe fuĝis al Malibu kun komercisto de “bijou”.

Suzana, Suzana, Suzana, Suzana “mon amour”.

Mi, fremdulo kaj turisto, vi, la stelo de Pigalle,  
kun surhaŭte, kiel vesto, kalsoneto de vual’.

Mi diris al vi: venu foren kun mi. Vi respondis: “Oui, monsieur”  
kaj mi diris: “mi revenos poste”.

Kaj vi: “Mais non, monsieur, ne vous inquiétez pas,  
je suis prêt à partir, prêt à porter, tout va bien!”

Suzana, Suzana, Suzana, Suzana “mon amour”.

Nun mi dronas en l’elspezoj, de uzuristoj la viktim’,  
eĉ mi pagas detektivojn sed ne sukcesas trovi vin,  
dum via edzo loĝas nun “chez moi”, manĝas kaj drinkas pli ol paŝa’.

Suzana, Suzana, Suzana, Suzana “mon amour”.

Vin atendas mi du jarojn, en la “bistrot du touriste”  
kaj subskribis tri kajerojn da biloj al la uzurist’,  
sed plu nenion scias nun pri vi... ĉu iam revenos vi al mi?

Suzana, Suzana, Suzana, Suzana “mon amour”.

Suzana, Suzana, Suzana ... ..